rinde ne estas postlasite, kiel venis en la kapon de la ĥemiisto *Adolf von Baeyer* (1835 – 1917) la ideo pri ĝuste tiu ĉi miriga miksaĵo. Konata tamen estas la nomo de la ureo-liverantino: nome la tiama amikino de la sciencisto Barbara, kelnerino en Munkena restoracio. Ŝi do fariĝis nom-patronino de la malonil-ureo (*Malonyl*-ureo), la barbitura acido kaj ties derivaĵoj, kiuj nomiĝas "barbituratoj". Ĝis la industria fabrikado kaj produktado de barbiturat-entenaj dormigiloj tamen pasis ankoraŭ kelkaj jardekoj. La ĥemiisto-esploristo *Baeyer* intertempe estis fininta la aferon kun la kelnerino *Barbara*, estis produktinta en 1878 la malhelbluan koloraĵon "indigo", por la unua fojo, sinteze (kiel ĥemiaĵo $C_{16}H_{10}O_2$ $N_2$), kaj estis ricevinta en la jaro 1905 la nobel-premion por ĥemio. (2005-06-30)

**Prigolfe**

En la jaro 1457 la Skotlanda Parlamento malpermesis la golf-ludadon. La malpermeson oni oficiale motivis per tio, "ke la junaj homoj tro multe cedas al tiu sporto kaj neglektas, pro tio, la pormilitan edukon de arko-pafado". 1488 reĝo Jakobo (*James*) la IV-a – mem entuziasma golfisto – dum sia entroniĝo nuligis la malpermeson (kiun ĉiukaze neniu vere observis). Cetere – tiu ĉi parlamenta dekreto estas la unua historia mencio de golfludado entute, kies "patrujo" do sendube estas Skotlando. Kaj en la skota urbo *St. Andrews* fondiĝis 1754 la golf-klubo laŭ kies reguloj oni ankoraŭ nuntempe golfludas. (2005-07-01)

**Pripopkorne**

La grajnoj de maizo, kiu eksplode turnas deinterne al ekstere la originan flavan koloron en blankan kotonecan blovaĵon, en ĉiu lingvo estas "*popcorn*", en Esperanto adekvatas "popkorno". Sed kial popkorno "popkornas" aŭ eble pli bone esperantlingve – hopkornas? Estu la nomo kia ĝi estu en la daŭro de lingvaĵa disvolviĝo: interesas la "eksploda popkorniĝo". La tiel funkciantan popkornon oni povas fabriki nur el maizaj semeroj. La "eksplodon" kaŭzas la humideco ligita kun ĝi ene de la amelo. La maizgrajnoj uzataj por popkorno enhavas pli da akvo



ol iuj ajn aliaj cerealoj, nome 13,5%. Aldoniĝas ke la ekstera ŝelo de maizgrajno estas tre malmola: ĝi eltenas vaporan premon ĝis po 15 kg sur $cm^2$. Dum varmigado la akvo en la maizgrajno etendiĝas sed estas retenata de la malmola grajnŝelo; denove etendiĝas la akvo kaj denove ĝi estas retenata; ĝi denove etendiĝas kaj estas denove retenata; ĝi plie etendiĝas – kaj – "*pop*" ! (2005-07-2/3)

**Pripave**

Fiera kiel pavo – forta fiero pri beleco! Aŭ ĉu la pavo estas nura belega malfortulo, nevireca ulo? Laŭ la fama etologo *Konrad Lorenz* (1903 – 1986, nobelpremiita en la jaro 1973) temas ĉe la "blua pavo" (*Pavo cristatus*) pri "evolua sakstrato". Sendube tre bela sakstrato: evoluis iu besto kiu disfaldas, por plaĉi al la alia sekso, trenaĵon de 130 ornamplumoj forme de granda rado, sur kies nebrila silka fono ekbrilegas pli ol 100 "okuloj" en koncentraj trikvaron-cirkloj – kaj meze de tiu "rado" videblas la kapo, gracile ornamita per eta krono. Ne opiniu tiun birdon kiel vantan malfortulon! En Hindujo, la sovaĝe vivanta pavo estas volonte vidata gasto en la vilaĝoj, ĉar ĝi mortigas serpentojn. La kuraĝa birdo atakas eĉ la 2-metrojn longan "reĝokobron" (*Ophiophagus hannah*) kaj batale venkas kaj formanĝas tiun plej grandan el la grupo de venenaj serpentoj! Mungotoj, hienoj, sovaĝaj hundoj kaj katoj tute ne kuraĝas ataki la kuraĝan birdon – ili sendube malvenkus ĉiun kontraŭpavan interbatiĝon... La blua pavo tamen devas timi du rabobestojn: la tigron kaj la leopardon. Sed ĉu la pomppluma birdo pro tio estas "sakstrato de la evoluo" kaj ĝia brila amludkostumo pura memmortigo? Tute ne. En la tropika pluvarbaro la suno nur malabunde penetras la densan foliaron kaj pentras malgrandajn, helajn cirklojn – el distanco la surplumaj "pavo-okuloj" ne distingiĝas, nur el la proksimeco montriĝas la malŝparema pompo. Sed, atentema kiel la pavo estas, ĝi certe ne permesas ke tigro tiom vivodanĝere proksimiĝus. Cetere – ekzistas en Barato parenca alispecia galinoforma birdo – la "spikoporta pavo" (*Pavo muticus*), kiu estas eĉ pli bela ol la blua